# La JUNA PENSO

ORGANO DE SAT-JUNULFAKO



prezentas:

Josef Burger

# RIDO SANIGAS

(Poemaro)

Jen saĝula viv-problem':
Ridi ankaŭ pri si mem,
sia propra erar-em' !

## EN HAVO

...Nia amiko...Josef Burger
.Rido sanigas !
Nek vizo, nek pasporto...
.Ne kredo - sed scio !
4.Esti "Homo" plej valoras!
9.Sakramento estas geedziĝo!
0.Detala enhavo

La Juna Penso
Dumonata gazeto
7 rue Caussade
F.33-BORDEAUX
Francio
Pĉk: 3374 04 Bordeaux

PASKO 1968
Eksterabona kajero
1 F.fr. (0,20 $)

# Nia amiko... JOSEF BURGER

Trafas min de temp' al tempo
dika aŭ maldika sendo
el la Ruhr-a regiono,
de la "herezul-fripono".

Jozef estas lia nomo,
homo, kiel ĉiu homo,
ĉar li laŭ la korpa formo
respektivas al la normo.

Tamen, absolutkontrasta
de la homamaso vasta
perfektiĝis la spirito
ĉe Jozefo ĝis zenito !

Li, iama katoliko,
skuas kvazaŭ el maniko
rimojn en perfektkvalito
kaj plenplenajn de kritiko !

Religion kaj snobismon,
patriotan naciismon,
Jozef vipas plenpasie
kaj ne malpli ironie !

"Risku pensi!" Ĉi-slogano
de l'konata "Kastelano"
nepre estu la principo
ĉies ajna Lanti-ido !

21.1.62 A.de l'Erikejo.

Burger Josef , (ps. Kastelano), germano , karbministo.
Nask. 21 jul.1881 en Clarenthal-Saarbrücken.
E-isto de 1913. Militservis 3 jarojn, varbis kaj instruis Esperanton ĉie, eĉ en la tranĉeo Postmilite multaj kursoj en Essen kaj ĉirkaŭaĵo. De 1921 ano de S.A.T., poste de ties Literatura Sekcio. Gvidis internacian korespondadon en E. por la Proleta Liberpensula Asocio en la Ruhr-regiono. Verkis kaj mem eldonis lernolibron germanlingvan por infanoj. 1926.
Socialista poeto. Liaj kantoj, poemoj,rakontoj kaj artikoloj abundas en la S A T - organoj kaj L E A - eldonaĵoj. Fekunda kantisto de aktualaĵoj. Li preferas la formon de kantoj, en kiuj li esprimas sin senpere, ne miskompreneble per simplaj vortoj. Li ne estas amiko de la poeziaj bombastoj, sed la ioman sekon de liaj ofte satirecaj versoj rekompencas tiuj socialistaj instruoj kaj profundaj pensoj, per kiuj plenas liaj strofoj.
Ankaŭ en la rakontoj li montras nenian emon al romantiko kaj sentimentalismo. Li ĉiam instruas kaj semadas socialismon.
De marto 1933 elmigrinto el Germanujo....

E M B A

(El "Enciklopedio de Esperanto" , 1934 )

---

Okaze de la 80-a datreveno...
Leterkopio

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
67,avenue Gambetta
P A R I S - 2 0

Paris,la 10.julio 1961.


Al k-do Josef BURGER

Kara Kamarado kaj Amiko !

Ŝajnas al ni, ke tia hardita sennaciisto kaj liberpensulo, kia konatiĝis kaj famiĝis sub la ŝercnomo "Kastelano" en nia frateca rondo (ĉar li ja neniam gardis kastelojn en sia vivo, krom "aerkastelojn"), kaj kiu fiere afiŝas sian matrikulon 601, tiel pruvante la pionirecon de sia aktivado en SAT, estas persono nepereeca aŭ ... nepere(ig)ebla... kaj, laŭ la humuro, kiun li verŝis sur nin ŝprucfontane okaze de la renkontiĝoj, ankaŭ ... nepereema.
..... Rido konservas ! Jen la pruvo !.... Simpatie

L.BANNIER
N.BARTELMES

# RIDO SANIGAS!



## L A   S E N R E S P E K T A   M A L S A N U L O

Karbministo pulmmalsana
devus veni hospitalon.
Sed tuj faris burokratoj
inter si paperbatalon
por eviti respondecon
pri la pago de l'fakturoj,
ĉar prizorgas karbministon
kvar diversaj asekuroj.
Tie en kontoroj luksaj
inter aktoj, nomo-listoj
amasiĝas tutarmeo
da altrangaj oficistoj,
kiuj ja pli bone vivas
ol la karbministo mem,
kiun nur pro paragrafoj
koleras burokrat-sistem'.

Same ankaŭ nun estiĝis
reciproka demandaro:
"Eble kaŭzis ĝin milito?!"
"Estas eble nur kataro,
kiu ofte forrapidas !? "
"Ankaŭ jam en junaj jaroj
li suferis je morbilo !"
"Ni ĵus trovis en aktaroj,
ke tusadis li tre frue
- eĉ jam kiel suĉinfano!"

Tagojn daŭris la esploroj
pri deveno de l'malsano,
ĝis alvenis la informo,
ke la malsanulo mortis
hejme, per si mem - sen helpo.
"Nun malordon nin alportis,
kriis tuj la burokratoj,
tiu senrespekta nulo !
Simple morti sen permeso
povas riski nur fiulo !"

(12.12.52)

## S I M P L A   V E R O

Homo , kiu viv-moderas,
Kuraciston ne bezonas:
Kapo, ventro ne suferas,
Nervozecon li ne konas !

Tial estas ĉef-afero
Por bonfarto de l'terano,
Krom batalo por Libero,
La konservo de la Sano !

(10.10.56)

## L A   B E S T O   K A J   L A   H O M O

Kiam hundo malsaniĝis,
ĝi kuŝrestas en trankvilo.
Eĉ nutraĵon ĝi rifuzas,
mem helpante por utilo
resaniĝi laŭ raci'.

Kiam sed malsanas Homo,
lamas li kun veobruo
en la liton , el la lito,
manĝas, trinkas pro enuo,
ĝemas, sed ne faras pli.

Pli racie agas besto
ol la ul' en homa vesto !

(18.2.55)

## R i d o s a n i g a s !

Por kuraci de malsano
taùgas ĉiu manipul',
se prudente kaj laùpove
ankaù helpas malsanul' !
Ĉar prudento helpas vin
eĉ sen ia medicin' !

### T U T E N E G R A V E !

Se kuracisto ekeraras,
kadavron li rapide faras.
Li skribas la eraron fine
en mort-ateston - sed latine.
Kaj heredantoj tre ĝentile:
"Ripozu li en Di' trankvile ! "

### V I V A N T A G A S U J O

Oni sin la ventron gaje
plenplenigas ĝis la rando.
La stomako prem-protestas,
preskaù krevas ventro-vando.
Baldaù gasoj tro efikas,
Voĉo ĝemas el angulo:
"Kiel fartas mi malbone !
Helpu, helpu min, karulo !"
Kiam ŝprucas la enhavo
de l'stomako pro ribelo
jam tra ĉiuj korpo-truoj
kaj eksplodi volas felo,
oni helpo-krie vokas
kuraciston el la lito.
Tiu nun al "Di-infano",
al hero' de l'apetito
nokton pene devas helpi
per injekt', pilol', klistero
por forigi nur la sekvojn
de l'diboĉo, malmodero.
Nur la paciento pentas
dum dolora temp' per vortoj
ĝis denove dum festeno
oni staras antaù tortoj.
Multajn homojn malsanigas
alkoholo, nikotino,
sed pli multajn ruinigas
la manĝaĵ' sen disciplino !
Best' libera estas saĝa,
vivas sane pro modero.
Homo estas pli sovaĝa
ol la besto pro malklero !

(2.7.54)

Se vi serĉas nerv-trankvilon,
Ĉesu mem vi bru-babilon !



R i d o   s a n i g a s !



## Ĉ I U   R A J T A S   V I V I !

Al kuracisto venas viro,
deklaras tuj per firma diro:
"Se kaptas min malsan', doloro,
rapidas mi nur al doktoro ! "
Jen tiu al la paciento:
"Min frapas via homprudento ! "
Nun la alia kun fervoro:
"Plenrajtas vivi la doktoro !
Kaj ankaŭ la apotekisto
samrajtas pri la viv-ekzisto !"
La kuracist': "En mia domo
ne estis tiel saĝa homo !"
Trankvile la alia diras:
"Kaj hejmveninte tuj mi iras
forĵeti la medikamenton !"
La kuracisto la klienton
rigardas mute, poste krias:
"Ĉu vi ĉi tion fantazias ?
Vi tempon, monon ja oferas,
post tio simple vi preferas
forĵeti la medikamenton !
Nun havas vi ne plu prudenton ! "
-"Ho jes ! Sed aŭdu la motivon:
Mi ankaŭ rajtas havi vivon !
Ne volas esti mi - pro timo -
ja nur "eksperiment-viktimo" !

(10.2.54)

## S U R   L A   I N V A L I D O - B E N K O

"Nenion scias kuracisto",
asertas firme invalid',
"mi ĝin elprovis kun persisto,
- por Li nun mankas ĉiu fid' ! "

Kontraŭas tiun ĉi aserton
tuj akre lia kamarad' :
"Akiris mi konvinkan sperton,
ke Li multscias per studad' !

Ĉar kiam pri pied' malvarma
ĉe kuracisto plendis mi,
eksplikis Li kun gesto ĉarma:
"Frostiĝo nur - nenio pli !


Sed tio estas ne malsano,
ne estas kaŭzo nun por tim',
ĉar homo ja ne estas rano,
fariĝis tio jam kutim' !

Ne scias kontraŭ ĝi rimedojn
eĉ nia tre moderna sci',
pro tio tiajn frostpiedojn
delonge havas ankaŭ mi ! "

(3.10.55)

Kiu evitas somere la sunon,
spertos dum vintro tutcerte la punon !

# NEK VIZO NEK PASPORTO!




## F I N F I N E   Ĝ O J I G A   K O M E N C O !

Antaŭ la ĉiela pordo staras homo.
Demandite pri deveno, lia nomo,
time montras li libregon de pasporto
kun permes-atestoj por la homtransporto
trans la iom multaj limoj sur la tero
inter landoj, maroj, eĉ en la aero.
Ankaŭ estis enstampitaj multaj vizoj,
kompreneble nur post pago de kotizoj.
Limoj donas bonintence - krom evito
de l'senlaboreco - iom da profito.
Sankta Petro pri la libro laŭte ridas:
"Senerare, tute klare mi ekvidas
jam de malproksime, malgraŭ eĉ miopo,
tiu povra homo venas el Eŭropo !
Por ekstermi sur la tero la malklaron,
la "Ĉiel-Ofico" sendu la deklaron:
"Ni informas vin en nom' de "Tutĉielo",
"Ĉirkaŭaĵo", "Ĉiu aneksita Stelo",
ke en niaj regionoj estas "Limo"
same nekonata vorto kiel "Timo" !
Tial estas por "Teranoj" post la morto
tute superfluaj vizo kaj pasporto ! "

(28.12.53)

## D I F E R E N C O !

Kiam foje karbministo
ne laboras pro malsano,
tuj estiĝas  karbo-manko
en la produktiva plano.
Kiam sed la ŝtato-estro estas for dum tuta jaro,
tamen ĉio bonfunkcias, plenturniĝas la radaro !
Povas esti, ke la dua eble estas superflua !?!


## P A R A Z I T-K O L E G O J

Se ie brilas generalo
kun ora "lad-ornam-kompleto"
sur ŝvela la heroa brusto,
asiste staras kardinalo
kun tre afabla ruz-rideto
en tarna ombro de arbusto !

Kunligas ilin la "hom-kulto"
sur bazo de popola stulto !

(11.6.61)

N e k  v i z o, n e k  p a s p o r t o !



## A U T O R I T A T - I N F L U O

Petro post ebria stato tre malsane pentas nun.
La edzino diras prave: "Jen nur laùnatura pun' !
Ne drinkante alkoholon agus pli prudente vi ! "
Petro krias: "Laù racio estus tio, sed pri ĝi
mi ne legis en Bibli' ! "

Karl' pro elegantaj ŝuoj havas kalojn ĉe l'pied'.
Multan monon jam elspezis li por kontraù-kal-rimed'.
Jen amiko: "Portu ŝuojn larĝajn, kaloj estos for !"
Karlo grumblas: "Simpla vero! Jes, sed tion - je honor' -
ne instruis profesor' ! "


Post milito plendas laùte pri viktimoj patriot',
sed postulas nov-militon stulte en naci-hipnot'.
Iu diras: "Kial pledas vi ne por pac-ideal' ?"
Li: "Prudenta tio estus, sed pri paco kaj moral'
ne parolis general' !"

Dum kongres' internacia, grava por mondproletar',
oni aùdis tridek lingvojn, nomis tion solidar'.
"Kial ne en Esperanto ?" mire tuj demandis mi.
Diris ano: "Laù racio estus tio, sed por ĝi
ne decidis la Parti' ! "

## REAKCIO ĈIE : S U P R E, M A L S U P R E !

Kiam brue la fervojo
longe jam trafikon kreis,
tamen tiam "Scienculoj"
tian eblon akre neis.
Same kiam Esperanto
venis kun por ni valoroj,
mokis per antikvaj lingvoj
plenŝtopitaj profesoroj.
Ke nun Esperanto servas
plene jam en mondrilatoj,
tio ne registojn ĝenas,
pagas ĉion la regatoj.
Ankaù la popolo kulpas,
ŝafe kredas je aplomboj,
sed insultas la aliajn,
kiam ree falos bomboj !  (29.4.53)

# Nek vizo, nek pasporto!





## GENIA SOLVO

Al iu Esperanta Rondo
laŭdire venis la respondo:
"Por la "Eŭropa Novarmeo"
neniel taŭgas la ideo
de tiu lingvo homkomuna,
ĉar ĝuste la soldato juna
obei devas aŭtomate,
neniam pensi homkompate !
Pri multlingveco la problemo
solviĝos simple per sistemo:
En la "Eŭropa Novarmeo"
kun laŭta "hura" aŭ kun veo
antaŭe en la front' laŭplane
parolos oni nur germane !
Sed malantaŭe en kantino
franclingve sonos kant' ĉe vino!
En luks-banejoj oni ŝercos
en angla lingvo kaj komercos !
Arme-diservo pro efekto
okazos en "Sar-dialekto" !
Kaptiton servos lingvo rusa
ĝis fino de la vivo ĵusa !
Do - Esperanto superfluas,
ĉar pacon Ni ja ne instruas !"


(11.11.54)

## LA MALAMIKINO

Dum la "Unua Mondmilito"
gardstaris en fremdlando mi.
Malvarme estis, vento blovis,
la pensoj ĉe la famili'.
Subite el apuda domo
alpaŝis min maljunulin',
dirante: "Vin mi aŭdis tusi,
pro tio mi kompatas vin !
Jen varma lakto en la poto,
bonvolu trinki ĝin sen ĝen' !"
Tuj kamarado min avertis:
"Ne fidu ! Estas en la pot' venen' !
Ja estas ŝi malamikino !"
Aŭdinte tion, ŝi nun mem
ektrinkis el la pot' kaj diris:
"Mi agas tiel pro helpem' !
Vi estas fremda, eĉ soldato,
sed tamen restas vi homfrat' !"
Nun ankaŭ mi la lakton trinkis,
boniĝis mia sanostat'.
Tuŝite kaj dankeme volis
mi pagi ĉion per moner',
sed tiu ĉi malamikino
rifuzis dankon kun fier' !



# NE KREDO
# – SED SCIO !



P A S K O   L A B O R I S T A :

" N E   K R E D O  –  S E D   S C I O ! "

"Paskofesto" : jen la tago,
kiam Kristo savis nin !
– diras pastroj al popolo,
nepensuloj kredas ĝin.

Kiu diras la fabelon
de farita homa sav' ?
Nur trompistoj – ĉiam sataj,
eble ankaŭ stulta sklav'.

Ili jam de du jarmiloj
kun la sama fanatik'
igas kredi je saviĝo
en malhela mistifik'.

La rezulto de ĉi kredo:
luksa viv' por parazit',
sed por produktantaj homoj
vivo en mizer' kaj ŝvit'.

Tial for la iluziojn,
ke nin savus religi' !
Ili ĉiuj senescepte
servas nur al reakci' !

Ne la kredo, sed scienco,
mempensado, homraci'
estas la saviloj, kiuj
gvidos nin al novsoci' !

(26.1.1929)

E K L E Z I A   R I Ĉ E C O

Dum kaj post la mez-epoko
preskaŭ jam sur ĉiu roko
vojrabistoj en kastelo
bone vivis nur per ŝtelo.

Laŭ tiama fimoralo
rabo estis ne skandalo,
se ĝin faris nur baronoj
aŭ krimuloj sur la tronoj.

(Same kiel ankaŭ nun
por prolet' nur estas pun' !)
Sed nobelaj partizanoj
estis ankaŭ bonkristanoj.

Por eviti la inferon,
ili donis rabaĵeron
al konsenta eklezio
je la glor' de l'kara Dio !

Kaj la eklezi-stomako
– jen avida kaŭĉuk-sako –
fordigestas ĝin sen peno,
ne demandas pri deveno !

Miru ne pri harmonio
inter graf' kaj eklezio !

P A R O L O J   N E   K O N V I N K A S !

Ja tre konvinke ne efikas,
se pastro laŭte finpredikas:
"En ĉiu ajn situacio
plenfidu nur al "Kara Dio" ! "
– sed mem li loĝas kun trankvilo
sub tre moderna fulmŝirmilo.
(22.5.53)

## K I U K U L P A S ?

Kvankam ili samon volas :
"longe vivi en abundo",
tamen pensas malamike
la leporo kaj la hundo !
Laŭ la plan' de l' "Kara Dio"
mankas ofte harmonio !

## L A S E N M O R T A J D I O J

Senescepte ĉiuj Dioj
Venis nur el iluzioj
Kaj ĝis nun ne malaperis,
Ĉar per ili ja prosperis
Ligo kun negoc-afero
Sub vualo de "Mistero" !
Dioj sen perfort', sen or'
Jam tre baldaŭ estus for !

## K R E D A F O R T O

Ĉar kutimo tia estis,
Kelka kiel suĉinfano
Brave iĝis jam kristano
Kaj fidele ambaŭ restis
Sen ŝanĝiĝo ĝis la morto
Dank'al firmkredema forto !

## F R E M D A M E D I O

Afabla pastro de vilaĝo
Demandis min: " En via aĝo
Akcepti devus vi prudenton
Kaj peti tuj la sakramenton !
Ĉu vi ne timas la inferon ?"
Mi diris: " Ne, ĉi atmosferon
Mi konas, ĉar por viv-ekzisto
Vivlonge estis karbministo !
Tro multe spertis mi suferon,
Nun timas mi ne plu inferon !
Sed tion pastro ne komprenas,
En karbminejon ne li venas ! "

# Virtuozaj teologoj


Nuntempa moderna scienco
kun forte kreanta tendenco
jar iĝis miraklo-faranto
koncerne al kvalito kaj kvanto,
atingis mirindan maturon,
esploras stelaran strukturon !
Sed antaŭ tekniko, kemio
progresas la teologio !
Dum ĉiu alia scienco
klopodas laŭ plan-konsekvenco
per helpo de fort', materio,
- laboras la teologio
alimaniere, abstrakte,
kaj tio efikas ekzakte !
Per la elprovita firm-ŝildo
"Transcenda, ĉiela mondbildo"
produktas la teologio
magie el pura nenio
fizikajn objektojn surterajn,
- precipe por pastroj - preferajn !
Jen ŝtupo plej alte scienca
kaj krome pastrece potenca !
Por tia kapablo, art-scio
konvenas "Nobelo-Premio" !

( 20.12.64 )

## V I L A Ĝ A I D I L I O

En la hejm-vilaĝo mia
preskaŭ ĉiu estas pia !
Inter ili estas multaj,
kiuj estas ankaŭ stultaj !
Dormas eklezia filo
ja en kloroform-lulilo !

(20.1.1953)



## L A  K O N T R O L - K U L E R O

Vilaĝan pastron trafis la informo,
ke lia episkopa superulo
vizitos lin laù la kontrol-regulo,
samtempe ankaù pro kontrol-reformo.

La pastro sian gaston luksregalis.
Por trinki, manĝi eĉ en brilprezento,
la manĝilaro estis el arĝento,
- intimaj paroladoj sin instalis.

Sed postan tagon la mastrumistino:
"Sinjoro pastro, mankas nun kulero !
Vi devas skribi tion en letero
al l'episkopa moŝto ...en Latino !"

La pastro tre indigne tuj protestis:
"Mi hontas tiel pensi nur, - sensenco !"
"Li eble faris tion sen intenco !"
La ino grumblis kaj obstina restis.

Do skribis li: "Pardonu, Via Moŝto,
sendube vivas Vi en plenhonesto,
sed - mankas nun kulero de la festo !
Se eblas, Vi klarigu ĝin per poŝto !"

Respondo: "Ne troigu la misteron !
Se estus vi dorminta - post vizito -
nur unufoje en la propra lito,
vi estus jam trovinta la kuleron !"

## R E L I G I O

Bonintenca estas ĉiu religio,
sed nur ĝis ĝi estas ŝtat-institucio.
Poste venas tutnature, sen intenco
la inklino al la uzo de potenco.

Dio estas art-produkto el nebuloj
de bonfartaj, parazitaj fak-varbuloj.
Religio eĉ en ĉiu ajna formo
estas por subuloj ĉiam kloroformo !
(27.12.61)

## F E L I Ĉ E,

## N U R

## E R A R K O M P R E N O !

Tri knabinoj el vilaĝo
iris jam en juna aĝo
en monaĥinejon fide,
sed  konstatis tre rapide,
ke ne  taùgis la destino
por  fariĝi  monaĥino.
Kiam  ili konsekvence,
tamen ree providence,
estis pretaj hejmen iri,
volis ĵus adiaù diri,
jen  demandis l'abatino
pri la nova viv-inklino.
Unu al teatro volis.
Dua pri meti' parolis.
"Mi fariĝos", jen la tria,
"ne volante esti pia,
ne vivante por abstino,
simple "Prostituistino" !
Tuj la abatino svenis,
poste pri klarigoj penis.
Nun la tria kun pasio:
"Bela estas profesio
por amuzi sin kun viroj,
kun la riĉaj kavaliroj !"
L'abatino: "Nun divenis
mi ĝin, ĉar mi miskomprenis !

( fino p.12. )

N e   k r e d o  –  s e d   s c i o !

## F E L I Ĉ E,
## N U R   E R A R K O M P R E N O !
(fino)

Nun konfesas mi plezure,
mi jam kredis plenterure,
ke vi volis pro obstino
esti nun "Protestantino" !

## Ĉ U   P O S T E   A Ŭ   J A M   N U N ?


En landoj regataj de Romo
mallumas en homo kaj domo.
Kaj same ĉe la reformitoj
Ne brilas tre lumaj spiritoj.
Eĉ kie aktivas kristsekto:
Nur kredo kaj ne intelekto.
Ĉar ili proklamas per vorto
Feliĉon, sed nur post la morto.
Profitas el tiu ĉi stato
Per helpo de leĝdona ŝtato
Nur bonza supera tavolo
Je kostoj de simpla popolo.
Sed ni, – ni jam volas sur tero
Konstrui en paco, libero
En frata komuno per faro
Bonfarton por tuta homaro !

## S E N K O S T A   R I D I G O

Li, kiu "ĉielon" inventis
kaj ankaŭ "inferon" eltrovis,
per multa humoro talentis,
plej belan spritaĵon ekprovis !

Pro tio elkore li ridis,
ĝis tiel li trovis la vojon,
per kiu plezure li vidis
surteran, senpagan viv-ĝojon !


(10.6.59)





## M A L F R U A   V E K I Ĝ O




En trinkejo fraŭlo Paŭlo
kun tre eta pens-provizo
ĝemas kun samspeca fraŭlo
pro perdita paradizo.
Jen alvenas nova gasto,
nekonata eĉ laŭ nomo,
kaj parolas sen prokrasto
kun la mastro de la domo.
Iu flustras en la rondo:
"Tiu ŝajne estas judo !"
Paŭl' sin ĵetas kiel ondo
sur la homon el la sudo,
lin insultas kaj lin batas.
Dume li elpuŝas krion:
"Judojn ege mi malŝatas,
Ili ja krucumis "Dion" ! "
Konsternite ĉiuj penas
trankviligi lin perforte,
for de l'gasto lin retenas
kaj persvadas lin mildvorte:
"Jes, sed tio jam okazis
antaŭ preskaŭ du jarmiloj !
Kial vi pro ĝi ekstazis ?
Ĝin forgesu ! – Jen konsiloj ! "
"Mi rapide ne forgesas
tiun krimon kontraŭ "Dio",
ĉar mi aŭdis – Paŭl' konfesas –
"nur hieraŭ ja pri tio ! "



(5.7.61)



N e   k r e d o  -  s e d   s c i o  !

# La "Tri-Reĝoj-Festo"



Je la "TRI-SANKTAJ-REĜOJ-FESTO"
tri karbministoj de la Ruhr
biciklis al vilaĝa nesto
en regiono ĉirkaŭ Bur,(germ.Buer)
ĉar tie loĝis kamarado,
kaj saniga estas krur-movado.


La trio estis bravaj viroj
kun iom eta pens-trezor',
sen utopiaj nub-aspiroj,
lertuloj sed pri manlabor',
kun kor' helpema kaj honesta
sub vesto simpla kaj modesta.

Alvenis ili tie bone,
kaj ĉar ja estis festotag'
por ili estis kor-bezone
unua komprenebla ag'
rapide - paŭzon eĉ eviti -
vilaĝ-preĝejon tuj viziti.

Sed ili venis tro malfrue
la pastro - tip' el Vestfali' -
predikis jam parolo-brue
pri l'Festotag-Evangeli'
en iom kruda maniero
laŭ kamp-media atmosfero.

Rilate al Tri-Reĝoj-Festo,
"De kie venis reĝoj tri",
demandis li kun montra gesto,
"por vidi Filon de la Di' ?"
En tiu sama la momento
la tri eniris en silento.


Ektimis ilin la demando
en miskomprena opini',
ke tiu pastro propagande
tutcerte celis ilin tri.
"Ĝin diru !" flustris la pli aĝa.
"Mi ne ! Vi estas pli kuraĝa !"



Kaj kiam sonis duafoje la samdemando en la rond',
ekbruis laŭte kaj plen-ĝoje de nia trio la respond':
"El BOĤUM jen la du apude, el WANNE mi, sed nur al-trude !"

(3.3.61)

# ESTI "HOMO" PLEJ VALORAS !



Jam evitante nikotinon,
kaj sen injekto, alkoholo,
ni ne bezonas medicinon,
ni sanas sen venen', pilolo,
- sed ĉio ĉi ne faras Homon !

Ruzuloj elokvente brilas ,
aliaj nur negoce fuzas,
al triaj cerbo ne utilas,
ĉar ili ĝin malofte uzas,
- sed ĉio ĉi ne faras Homon !

La lukto por Libero, Vero,
por ke stulteco estu fora,
kaj malesperu per hoмklero
servista klasoj kaj sinjora,
- nur tio faras veran Homon !

(9.1.63)

PRIINFANA EDUKADO

Junpatrino kun deziro
boneduki infaneton
petis de maljuna viro
taŭgan "Edukad-sekreton":
Kiel eble jam tre frue,
sen kutima kor-ĉagreno,
ankaŭ eble ne tro brue,
sen la nervdetrua peno !
Krome petis ŝi konsilon,
ĉu por veki la talenton
ŝi apliku la batilon,
- la klasikan elementon ?!?
De la viro la respondo:
"Jen problemo ĝenerala,
ne por vi nur, por tutmondo !
La eduko ideala
ja ne estas pun-afero !
Ĝin por ĉies kontentiĝo
jam komencu kun espero
longe antaŭ la naskiĝo ! "

SPIRITA
MANK - ATESTO

Multon oni devas lerni
por fariĝi ŝufaristo,
eĉ trapasi ekzamenojn,
ĝin postulas ŝtatinsisto.
Lernotempo daŭras jarojn,
tamen estas ĝi bezona,
se vi volas rajtoplene
esti ŝufaristo bona.


Sed fariĝas pli facile
oni patro kaj patrino.
Leĝe lerni ne bezonas,
jam sufiĉas la inklino.
Ambaŭ rajtas esti stultaj,
tio ne koncernas ŝtaton,
ĉar stulteco garantias
ofte bonan rezultaton.

Nun pro tio, ke la ŝtato
celas bonan ŝufaranton,
sed por la infanprodukto
altpremias nur la kvanton,
vidas ni nun sur la tero
multajn homojn sen prudento,
sed kapablaj kun fiero
por najbar- kaj men-turmento !

(17.3.55)

Ni lernas tre frue facile paroli,
sed poste nur pene ĝin ankaŭ kontroli !

## E s t i "H o m o" p l e j v a l o r a s !



### B O N A K O N S I L O

Preĝejon, drinkejon evitu
Pro densa nebul-atmosfer' !
Naturon, sunbrilon vizitu,
Birdkanton en freŝa aer' !
Ĉar kie vortbruo silentas,
Foriĝas de homo la tim',
Interne feliĉon li sentas
Pro sano de korpo, anim' !

=-=-=-

### D I F E R E N C O

Preferu eduki fremdulojn !
Ne risku komenci ĉe vi,
Vi devus vin ŝanĝi hodiaŭ,
Sed mankas por ĝi energi' !
Pro tio eĉ malgraŭ bonvol'
Nun ĉie nur regas parol' !

=-=-=-

### L A V E R O E S T A S S I M P L A

La vivon kun bremsaj skrupuloj
rigardas malsata vir-kato
per tute aliaj okuloj
ol sata, senzorga kat-frato !
Jen simpla montrilo al vero
en ŝajne komplika afero !

=-=-=-

### V E R A F E L I Ĉ O

Ne sentas feliĉon bruuloj,
ĉar tro delikata ĝi estas.
Ĉe tiaj banalaj terbuloj
la pura feliĉo ne restas.

Vi trovas ĝin nur en la koro
luktante por rajto kaj vero,
celante per via laboro
bonfarton por ĉiuj sur tero !

(1922)

=-=-=-

Kia estas via viv-laboro,
tia estas via viv-valoro !
(27.4.58)

### B O N V O L U E L E K T I !

Aglo flugas kun fiero
sola en sunbril', aero.
Vice lamas ansereto
en ansera societo.
Pork' nur ridas ĉe manĝ-poto,
eras ruli sin en koto.
Diru, kiu el la tri
estu ideal' por vi ?!?

-=-=-=-=

Laŭtplendas pesimisto kun dolor':
"Duono de l'somero estas for! "
Sed kantas optimisto kun pasi':
"Duono de l'somero antaŭ ni !"
Do pri la sana fakto pensas du
malsame , - tial daŭra vortobru' !

-=-=-=-=

Nur simpluloj pensi povas rekte
kaj pro tio ankaŭ tre korekte.
Sed registoj pensas ĉirkaŭ kurbo,
tial regas daŭre mond-perturbo !

(26.2.58)

-=-=-=-=

Feliĉo , fondita en koro
kaj ne sur ekstera brubrilo,
restadas kun ĝoja trankvilo
ĝis nia tutlasta viv-horo !

(20.10.56)

-=-=-=-=


Mi vidas malbelon en ĉio,
se mankas en mi harmonio !


# Circulus vitiosus !


De Alexis

Ni buĉas la bestojn, ni verŝas bestsangon,
restaĵo tre tiklas de l'homo la langon.
Laŭ "Speco Viena" ni fritas brunkrustajn
kotletojn de l'besto aparte bongustajn,
ĉar sangan viandon ne ĉiu hom' ŝatas,
sed multaj aliaj pro ĝi eĉ sin batas.
Ni homoj formanĝas kun certa prefero
la fiŝojn el maro, el lago, rivero.
Ni pafas ĉasaĵon en verdaj arbaroj,
kondutas tiele jam kiel barbaroj.
Ni nomas ĉi-krimon "bravula hom-sporto",
ne pensas pri fakta, kruela bestmorto.
Dum horoj ni ankaŭ egale motive
malantaŭ fiŝ-hoko gap-sidas pasive.
Por koko, ansero, kolombo, anaso
serv-pretas bredejoj en ĉiu amaso.
La vivo de porko, ŝafido kaj bovo
dependas de nia kaprico, bontrovo.
Buĉistoj eĉ kaptas al nobla ĉevalo,
- buĉita bestaro : "Vend-materialo" !
Kaj kio je buĉo ankoraŭ postrestas,
jam baldaŭ en ia "kolbaso" enestas:
restaĵo vianda, porkhaŭto, bestgraso,
internaj organoj fariĝas kolbaso.
Abunde spicite, en multaj aromoj,
diversaj la formoj, multnombraj la nomoj,
ĉi tiu frandaĵo aparte bongustas,
kaj ĉiu momento por manĝi ĝin ĝustas.
Kolbason manĝante, ĝin ĉiu eklaŭdas,
li ĝemon, ve-krion de l'besto ne aŭdas,
kruelan torturon dum buĉo ne vidas,
por li nur momenta bongusto validas.
Neniu ekpensas, manĝante bestpecon,
ke portas li ankaŭ por si respondecon,
ke oni estingis fajreron de l'vivo,
- el sama konsistas la hom-kolektivo !

(fino p.17)








## C I R C U L U S V I T I O S U S !

(fino)

Post pacaj epokoj en vivo-komforto
eksplodas milito kun plagoj kaj morto.
Antaŭa bestbuĉo nun estas batalo,
viktimo nun homo, ne nur animalo.
Nun homo alian kruele perfortas,
nun devas li murdi, sed ankaŭ li mortas.
En lia interno furio agitas,
al faroj teruraj ĝi lin nun ekscitas.
Li, kiel heroo, hejmlanda gardisto,
ekstaze kapablas sen ia rezisto
oferi sin mem nun kaj multajn aliajn,
rabie forŝovas pripensojn raciajn.
Sur kampo de l'gloro, sur kamp' de l'honoro,
- en vero: buĉejo kun ploro, doloro,
nun kuŝas en koto viktimoj militaj
kaj partoj de homoj tre dispecigitaj.
Puniĝas ĉi tie la manko kultura:
La cirklo fermiĝas laŭ leĝo natura
kun nomoj: vivsorto, fatalo, destino !
Ho Dio ! direktu homstulton al fino !

Libere tradukis J.Burger (27.4.62)



## L E R N U S I L E N T I !

Antaŭ ol vi ekparolas,
vin demandu kun atent',
ĉu la loko nun bonvolas,
ĉu nun ĝustas la moment' ?
Ĉar sen tio ne la celon
trafas bonintenca vort',
ne atingas ĝi orelon,
- vana estas ĉia fort' !

(6.10.54)

En la homa vivo ludas
grandan rolon la kutimo !
Tial saĝa hom' konkludas:
"Estus tasko de l'reĝimo
planti nur kutimojn bonajn
en la koron de l' infanoj;
ŝparus vortojn ni admonajn,
- ĝojus ĉiu civitano ! "

(30.3.1961)

E s t i "H o m o" p l e j v a l o r a s !



## K I A L D U C E R B O J ?!?

Kial portas kun fiero
ĉiu homo sur la tero
duan cerbon en la piro ?
- diras ofte mi kun miro.
De la cerboj la unua
eĉ jam estas superflua
por la homaj stultaj faroj
je si mem kaj je najbaroj !
Kie pensas mem popolo ?
Ĉu ne taŭgus por simbolo,
ke anstataŭ cerbojn du
portu homoj eĉ kun ĝu'
bovo-kornojn ĉe la fruntoj
eĉ kun pezo de ok funtoj ?!?



=-=-=-

## H O M - V A L O R O

Granda povus esti eĉ la reĝo,
se li agus laŭ humana leĝo !
Jam pli granda estas scienculo
esploranta laŭ homec-regulo !
Sed plej supre saĝa homo staras,
kiu diras: "Eble mi eraras !"

(24.8.65)

=-=-=-

Kiu dum manĝado legas,
ĝuas ambaŭ nur duone !
Kion ni duone faras,
nin neniam servas bone !

=-=-=-

Se stultulo foje ŝajn-kontentas,
tiam nur, ĉar li ja ne komprenas,
kiel sian vivon li turmentas,
ke al grego jam li apartenas !

(8.6.57)

=-=-=-

Malfido: jen nur penssistem',
se foje mi jam ŝtelis mem !

## F E R I A J P L E Z U R O J

Dum mia ferio, en Alpo-vilaĝo
mi vidis personojn en ĉiu viv-aĝo
kun kropo ekstere pendanta ĉe l'kolo,
- jen ofta malsano ĉe Alpa popolo.
Rigardis mi ludon infanan sur strato.
Subite fariĝis mi cel-atakato.
Komence ĝi estis por mi eĉ plezuro,
sed baldaŭ mi devis min savi per kuro,
se mi ja ne volis fariĝi ruino.
Nun kriis el domo maljuna virino:
"Tuj lasu trankvila la povran sinjoron!
Rifuzis jam Dio al li la favoron
fieri pri kropo, - al ni donacita !
Per tio li estas sufiĉe punita !"

(22.6.59)

=-=-=-=

## K I E R E S T A S L A H O M O ?

Ni faras veran kulton
jam pri antikva domo,
sed aŭdas nur malmulton
pri la mizera homo.


Pri famaj piramidoj
ni legas kun fiero,
- nenion pri likvidoj
de la popol-mizero.

Pri kronoj, sceptroj, glavoj
ni lernas en glor-bruo,
sed pri l'mizer' de l'sklavoj
nenion per instruo.

Ni devas nin demandi,
ĉu estas homkulturo
prefere propagandi
pri "tre antikva" muro ?!?

(27.3.61)

# Sakramento estas geedziĝo !



"Sakramento" estas geedziĝo !
Ore registrita en ĉielo !
Tial oni povas ofte aŭdi
- post forpaso de l'geedz-mielo -
"ĉielaĵojn " dum parol-duelo:
"Ho! mia Dio !" - "He! firmamento!"
"Ha! fulmo-tondro!" - "Hu! sakramento!"

## R I D O   S A N I G A S !

En fervojo mi veturis,
studi homojn mi plezuris.
Apud mi dugambulino
laŭtrakontas kun obstino,
ke en sonĝo dum la dormo
trafis ŝin la ĝoj-informo,
ke ŝi havos edzon duan.
Ŝi forigas dubon pluan:
"Ne rakontas mi fabelon,
klare vidis mi kamelon !
Laŭ egipta sonĝ-ekspliko
jen la dua viv-amiko!"
Mi aprobas sen skrupulo:
"Tio estas jam regulo,
ke al dua viv-duelo
povas iri nur kamelo !"

(13.1.57)

## H U M A N A   K O N S I L O

Paŭlo, eta vir-persono,
pezas funtojn naŭdek kvin !
Tio estas la duono
de la pezo de l'edzin',
kies bela nom' "Rozeto"
tre kontrastas ja al ŝi,
ĉar ŝi estas - krom atleto -
reĝo en la famili'.
Iun tagon ŝi ordonas:
"Ni tuj iru al butik',
novajn tasojn ni bezonas !"
- Li obeas sen kritik'.
La vendisto tuj komprenas,
ĉar ĉi malegala par'
jam de longe apartenas
al fidela klientar'.
Ili venas ĉiun lundon,
- la etul' kun la tiran' -
por aĉeti var-abundon
el argilo, porcelan'.
La vendisto pro kompato
al la povra sam-seksul'
kun ekstrema delikato
flustras kaŝe en angul':
"Jen la tasoj el argilo
taŭgas ne por hejm-batal' !
Prenu tiujn kun trankvilo
el stabil-malpez-metal' ! "

(11.3.61)

## M I A   P A T R I N O

Bona mia Panjo estis !
Naŭ infanojn amis ŝi.
Mankis pano, tamen restis
hejmintima harmoni'
per la bonpatrina koro !

Mia bona Patrineto
nun forestas longe jam,
tamen ŝia vivportreto,
ŝia patrineca am'
restos danke en memoro!

( 7. 12. 56 )

Memorige: De k-do Josef Burger jenaj poemoj jam aperis en LJP :

Libera Volo - Ne ĉiu emas ŝerci ...nº 45

Enigmoj por ĉiel-agentoj multkoloraj
La Bona Flanko - Neniu ĝin rimarkis ...nº 46

Averto ...nº 47
La Tri ĝoj-kreantoj - Mono kun prudento - Plej efika kuracilo - Kial ne simple? ...nº 48
La sav-komisionoj - Normala germano feriis - Trono,krono: ne bezono - Savilo facila ...nº 49
Kiu agis ĝuste? - Ĉiu havas siajn zorgojn ...nº 50
Facila konsolo - Pli facile estas kredi ...nº 51
Trista konstato ...nº 54
Pro persona intereso ofte lamas mondprogreso - En Svedio ...nº 55
Kaj dormas estontaj viktimoj - Libera volo ...nº 56
Kuraĝa afero ...nº 57
Por feliĉo sur la tero - Bedaŭrinde! ...nº59

.................................

Krome, la suplementa LJP-kajero "ORIGINALA KANTARETO DE S.A.T." enhavas 15 originalajn kantojn de k-do Burger , kun la muziknotoj.

.---===o===---.

# enhavo


2.Nia amiko...Josef Burger
3.Rido sanigas!
Senrespekta malsanulo - Simpla Vero
4.Tute ne grave! - Vivanta gasujo
5.Ĉiu rajtas vivi ! - Sur la invalido-benko
6.Nek vizo, nek pasporto...
Finfine ĝojiga komenco! - Diferenco !
Parazit-kolegoj
7.Aŭtoritat-influo - Reakcio ĉie: Supre, Malsupre!
8.Genia solvo - La Malamikino
9.Ne kredo - sed scio!
Pasko laborista: Ne kredo - sed scio!
Eklezia riĉeco - Paroloj ne konvinkas
10.Kiu kulpas? - Virtuozaj teologoj
Fremda Medio - Vilaĝa idilio
11.La kontrol-kulero - Religio
Feliĉe, nur erarkompreno!
12.Ĉu poste aŭ jam nun? - Senkosta ridigo
Malfrua vekiĝo
13.La "Tri-Reĝoj-Festo"
14.Esti "Homo" plej valoras!
Priinfana edukado - Spirita mank-atesto
15.Bona konsilo - Diferenco - La vero estas simpla - Vera feliĉo - Bonvolu elekti!
16.Circulus Vitiosus!
17.Lernu silenti!
18.Kial du cerboj? - Hom-valoro
Feriaj plezuroj - Kie restas la homo?
19.Sakramento estas geedziĝo!
Rido sanigas! - Humana konsilo
Mia patrino


.---===o===---.


La Juna Penso
dumonata organo de S.A.T - Junulfako
stencilita, 20-paĝa, malmulte kosta
estas de ĉiuj abonebla.
Perantoj en multaj landoj.
Petu specimenon aŭ sendigu ĝin al konatuloj viaj, skribante al LJP-sekretario:
K-do Christian Baudé F.47 - Laroque - Timbaut (Francio)
LJP-redakcio atendas viajn kontribuojn: K-ino Martine Méchin F.87-Châteauponsac
Jarkotizo:- 5 F.fr. al "La Juna Penso" 7,rue Caussade F.33 - Bordeaux (Francio)
Poŝtkonto: 3374 04 Bordeaux
- aŭ egalvaloro (14 steloj) al via landa peranto.

Le Gérant: C. BAUDE
Imprimé chez H.DUFOURG
33 - ARBANATS
Commission paritaire nº39863